Om man tittar på esperanto i stället så är det kanske inte lika lätt att lära sig i och med att endast stammarna av de latinska, och därmed romanska, orden finns kvar. Dessutom består esperanto av nykonstruerade affix (för- och efterstavelser), vilka kan vara svåra att lära sig. Det kan ju

också vara en nackdel att man behöver lära sig dem. Det ska dock sägas att det finns även affix som förekommer i andra språk. Grammatiken då? Ja, esperanto är lika regelbundet som interlingua. En del säger att det är lättare än interlingua på så sätt att det innehåller färre affix. Den internationella gångbarheten hos esperanto torde vara lite sämre i och med att det blir som ett helt nytt språk att lära sig.

Så, vad kan man då tycka är det bästa språket? Det som är mest lämpat för att bli internationellt vedertaget? Jag har naturligtvis bildat mig en uppfattning om det allteftersom jag har fördjupat mig i ämnet, men jag vill inte klarlägga här vad som är min övertygelse, utan jag vill att alla som läser det här arbetet ska kunna komma till en egen slutsats utan att jag lagt alltför mycket vinklade värderingar om endera språket.

Jag hoppas, att det sunda förnuftet råder utan politiska värderingarna till en bättre kommunikation.

Anna Emilsson

*Tio ĉi estas nur partoj de la raporto. La tuton (15 A4 paĝoj) vi povas ricevi de Anna Emilsson Hjortalidsvägen 285-65 290 60 Kyrkhult*

*En nia "La Veka Bulteno" la raporto verŝajne estas iom pli longa. Ĝi ankaŭ enhavas mian komenton pri Interlingua.*

Wim Posthuma

## UK en Zagrebo 21 - 28 julio 2001

La prezidento de Respubliko Kroatio, Stjepan Mesić akceptis esti la Alta Protektanto de la 86-a UK, enirante tiel la riĉan liston de ŝtatestroj en tiu funkcio kaj simbolante la vastan subtenon al Esperanto en Kroatio.

La kroata poŝto omaĝos la 86-an UK per porokaza poŝtmarko, la unua UK-rilata poŝtmarko de post la Havana UK en 1990.

Oni kongresos paralele en du lokoj: la eleganta koncertejo Vatroslav Lisinski kaj la proksima Elektroteknika Fakultato. Kelkaj programeroj okazos ankaŭ aliloke...

Oni antaŭvidas tri antaŭ-kaj postkongresajn ekskursojn, ĉefe laŭ la rava marbordo: Istrijo kaj Kvarnero, Meza Adriatiko kun arkipelago Kornati, Suda Adriatiko kun Dubrovnik. Inter la tuttagaj ekskursoj elstaras la famegaj lagoj de Plitvice, Kumrovec (la naskiĝloko de la antaŭa prezidento Tito), la montara Zagorje-regiono kaj la cikonia vilaĝo Ĉikoš.

(El Esperanto novembro 2000)

# ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

## Volumo 5: S—Z

### 196 paĝoj, 240 kronoj

Eldona Societo Esperanto, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm





**GOO INTERRETE**

Japana Esperantista Go-Asocio JEGA jam malfermis kaj funkciigas inter-re-tajn retpaĝojn, en lingvoj japana kaj Esperanta ĉe: <http://www12.freeweb.ne.jp/art/jega/>

La paĝo intencas esti ilo instrua por komencantoj, amatoroj kaj profesiuloj de Goo.

(El Eventoj n-ro 202, 2/ januaro-2001)

**Intryck från 50:e KELI-kongressen**

...”Kongresejot” var trevligt och bra och vackert beläget i denna sköna bergstrakt. Det är en kurort med stora behandlingshem och sjukhus främst för rörelsehindrade och t.ex. barn med sviter efter polio och sjukdomar i centrala nervsystemet o.s.v. Kurorten bygger mycket på dess 27-gradiga hälsovatten. En brunn fanns nere i centrum där man kunde dricka kallt hälsovatten.

... Årets tema var ”I begynnelsen var Ordet”. Föredragen handlade följaktligen om tjeckiska författare och poeter såsom Karel Čapek, Karel Hynek Macha och Bozena Nemcova. Johan Hus var ju en känd tjeckisk reformator och dömdes till döden för kätteri och brändes på bål levande 1415. Pedagogern Johann Amos Komensky (Comenius) 1592-1670, var temat för ett annat föredrag. Han vistades även i Sverige en tid och träffade bl.a. drottning Kristina som lärt sig latin via hans läroböcker. Vår äldre medlem Rudolf Horsky har doktorerat på ämnet Comenius. Dessa två sista föredrag var för mig mycket intressanta. På helgdagsutflykten per buss besöktes slottet KUKS (hospitalet Kuks har jag antecknat) och följaktligen fanns ett stort apotek till beskådande - underbart ställe med massor av spännande burkar och lådor! På gården fanns ett stort antal skulpturer och även i en utställningshall intill. Dessa beskrev mycket levande människans egenskaper, vår onda och goda sida såsom tro, hopp och kärlek, visdom och stolthet, girighet och frivolitet. Utanför i skogen fanns det flera skulpturer uthuggna i förmodligen kalksten. Nedanför i dalen rann den på andra håll så breda floden Elbe som fridfull å.

Nästa utflyktsmål var Nachod

med sitt slott. Högt beläget (som nästan alla slott) och pampigt. De flesta av oss spånstade upp i ett högt torn på taket, dock inte undertecknad. I en torrlagd vallgrav gick det brun-björnar! En trevlig dag i ett vackert landskap.

Två manliga operasångare från operan i Ústí nad Labem sjöng för oss vid två tillfällen. På söndag kväll i kyrkan en underbar konsert med 22 bibliska/andliga sånger på esperanto till piano. Till musik av Dvorák, Bach, Beethoven m.fl. På torsdag offentlig konsert (men till kongressens ära) i stadens biografalong kl. 19.00. Presenterades på tjeckiska och esperanto. Från opera- och operett-världen. Mycket trevligt.

Vi fick se en mycket gripande video-inspelning från en begravningsgudstjänst. Den döda var en mycket känd esperantist, chefsdelegat för Tjeckien i UEA och medlem i KELI, Stanislava Chrdlová. Hon var anmäld till kongressen men avled 28/1. Maken Petr deltog dock och hade ork att delge oss detta svåra. Vi är tacksamma.

På årsmötet blev det stor ommöblering i styrelsen i det att Adolf Burkhardt avgick som ordförande men kvarstår i styrelsen. Eva Farkas, David Featherstone och Arne Lundkvist avgick ur styrelsen. Nya blev Irén Bagi från Budapest och Sveriges tidigare ordf. för KEF Bengt-Olof Åradsson. Jacques Tuinder blir ordf. efter Adolf

**Britta Rehm**  
(Ur Kristliga Esperantoförbundets Medlemsblad Nov. 2000)

**Bertil Wennergren akademiano**

La 6-an de aprilo 2001-a komisiono konsistanta el Antonio De Salvo, prezidanto de IKUE, Michela Lipari, g'enerala sekretario de UEA kaj Giorgio Denti, prezidanto de la Esperanto-Grupo de Romo, en la c'eeŝto de la sekretario de la Akademio, malfermis la kovertojn kun la voc'doniloj kaj nombris la voc'ojn.

Sekve de tio la Estraro de la Akademio deklaras elektitaj por 9 jaroj la jenajn kandidatojn (apud ĉiu nomo estas la nombro de la ricevitaj voĉoj):

Probal Daŝgupto	31
Humphrey Tonkin	31
...	
Bertil Wennergren	22
...	

A.M. Ritamäki

**Esperantosilvestro en Ĉeĥio**

Nia leganto Evald Olsson en Bengtsfors peras ankoraŭ (Vd La Espero 2000:4 p. 9) unu artikoleon de Ĉeĥio. La klubo en Česká Trebová festis siajn 40 jarojn.

La 29-an de decembro 2000 festis nia Esperantorondeto Amikeco Esperantosilvestron kiel ĉiujare. Ĉeestis ĝin ĉirkaŭ 80 personoj el diversaj anguloj de Ĉeĥio, eĉ nia rondetanio Gerry el Nederlando kaj samideano Brian el Ameriko. Al danco kaj kanto ludis 5-ana muzikgrupo.

La vespero komencis per vespermanĝo. Ni helpis disdoni ĝin. Nur poste mi bonvenigis ĉeestantojn en nomo de nia Esperantorondeto. Tiu ĉi Esperantosilvestro estis escepta, ĉar de la komenco de la vespero estis ellotumita gajninto de unusemajna restado en Česká Trebová el gesamideanoj, kiuj salutis Amikecon okaze de ĝia 40-a datreveno. Alvenis bondeziraj el 41 landoj. Mia nepino Klárka el 176 bondezirintoj eliris numeron de samideano el Chicago, kiu bedaŭrinde ne skribis adreson. Estis necese lotumi denove. Nun estis la unua familio el Francio. Mi jam anoncis al ili tion. Kvankam mi pensas, ke unu familiano volos alveturi, ni ellotumis por ĉiuj kazoj duan samideanon el Estonio kaj trian samideanon el Japanio. Mi skribos al la dua aŭ al la tria nur se ne volus veturi iu el la franca familio. Bildkartojn povis ĉeestantoj rigardi en malgranda ekspozicio dum la tuta vespero...

Post konkurso mi "instruis" matematikon, gimnastikon, legadon kaj kantadon en mallongaj paŭzoj inter danco. Kaj ankoraŭ alian rolon mi ricevis. Jiri Pistora preparis novaĵojn el la jaro 2900 kaj mi kun Hana faris radioparolistinojn.

Dum noktomezo kiel malnova Esperanta jaro 2000 mi admonis gerondetanojn al pli granda diligenteco kaj disadiaŭis kun ili. Lernilojn mi volis doni al nova Esperantojaro 2001, mia 9-jara nepino Ivetka, sed ĝi nenion bezonis. Eĉ instruiston ne, nur modernajn lernilojn. Nova jaro tostis kun ĉeestantoj kaj komencis disdonado de "valoraj" donacetoj. Mi kun aliaj gerondetanoj faris "donacportistion." Kaj post la fino de la vespero eĉ purigistinojn, kaj en lito mi kuŝis je la kvina matene.

Mi devas laŭdi kelkajn gerondetanojn, kiuj zorgis pri manĝado, tranoktado, preparo de programo, ornamo de la salono k.t.p. Eĉ Klárka kaj Sárka el mia estinta Esperanto-infana grupo multe helpis kaj dum la tuta vespero servis ĉe teleroj, tasetoj, tostoj, ... Mi esperas, ke almenaŭ iu daŭrigos en Esperantoagado en nia urbo...

Zdenka Novotná



## E-kurso en tutnacia gazeto

Ukrainia gazeto "Zagranica" (analogo al rusia "Inostranec" - temanta pri eksterlandaj kulturo, laboro kaj vojaĝoj) ekde la unua ĉi-jara numero komencis publikigi mian konatigan kurson de Esperanto "Izuĉajem esperanto", aperintan pasintjare en reta dissendo "Novosti E-dvijenija".

La eldonkvanto de "Zagranica" estas 25 mil ekzempleroj. Kun la enhavo de la gazeto oni povas ankaŭ konatiĝi rete <http://www.zagran.kiev.ua/>

La kurso (kaj aliaj priesperantaj materialoj) aperas en "Zagranica" dank'al la fakto, ke unu el ĝiaj redaktoroj estas aktiva ukraina e-istino Ĵenja Zvereva.

**Andrej Grigorjevskij**  
(*El Landa agado*)

## Esperanto instruata en eŭska universitato

En la lerneja jaro 2000/2001 Esperanto eniros la eŭskan universitaton, "Universidad del Pais Vasco/Euscal Herriko Unibertsitatea" kiel elektelebla studobjekto. La kursoj daŭros 45 studhorojn kaj validos 4,5 kreditojn. Esperanto estas jam enkondukita en pluraj universitatoj en Hispanio, eble tiu nova paŝo plu instigas aliajn universitatojn enkonduki la internacian lingvon kiel elekteleblan studobjekton.

(*El Boletín n-ro 346 citita en Eventoĵo n-ro 202, 2/januario-2001*)

### KOREKTO

La debatartikolo "Sennuance pri Raŭmo" sur p. 13 de *La Espero* 2000: 5-6 bedaŭrinde malhavis gravan "ne". La parentezon de la antaŭlasta alineo ni devas kompreni kiel: "... kaj mi ekzemple ne allogiĝas de la Praga Manifesto pro ĝia ignoro de la signifo de originala esperanta beletro."

## Esperanto-kurso per radio

Dum la proksima monato [februaro] Radiostacio Rio-de-Ĵanejro (Brazilo) dissendos novan kurson de Esperanto. La metodo por portugala-lingvanoj titolita "Aŭdu kaj Lernu" estas farita de Sylla Chaves, konatega brazila Esperanto-instruisto. La programo "Kurso de Esperanto per Radio" estas disaŭdigita ĉiudimanĉe je la 6.45 antaŭtagmeze.

Ĝia ret-poŝta adreso estas [linguadafaternidade@bol.com.br](mailto:linguadafaternidade@bol.com.br)  
(*El NUN*)

# Internaciaj radioelsendoj al Eŭropo

Horoj laŭ Mezeŭropa Tempo (MET)  
Valida ĝis 2001-03-25  
Frekvencoj en kHz

### Ĉiutage

10.30-11.00	Pola R. Varsovio	Sat (1)
15.30-16.00	Pola R. Varsovio	7275,7285,Sat (1)
20.00-20.30	Pola R. Varsovio	7130
21.00-21.30	Pola R. Varsovio	Sat (1)
21.00-21.27	Ĉina R. Int.	7110,7265,9965

(25 min) Pola R. Varsovio/WRN  
TTT (<http://www.wrn.org/stations/poland.html/>)

### Dimanĉe

20.30-21.00	R. Havano Kubo	13660,13715,13750
21.20-21.30	R. Vatikana	527,1530,4005,5880,TTT

([http://www.vatican.va/news\\_services/radio/](http://www.vatican.va/news_services/radio/))

22.30-22.55	R. Aŭstria Int.	5945,6155,Sat (2),Sat (3)
23.00-23.30	R. Havano Kubo	13660,13715,13750
23.50-23.59	R. Vatikana	527,1530,4005,5880,

TTT (30 min) R. Aŭstria Int.  
TTT (<http://roi.orf.at/esperanto/welcome.html>)

Rimarko: La dimanĉa elsendo de R. Vatikana okazas ankaŭ dum kristanaj festotagoj, samhore.

### Marde

09.30-09.45	Estona R.	TTT ( <a href="http://www.er.ee/tallinn/">http://www.er.ee/tallinn/</a> )
-------------	-----------	---

### Merkrede

21.20-21.30	R. Vatikana	1611,7250,9645
-------------	-------------	----------------

### Vendrede

22.30-22.55	R. Aŭstria Int.	5945,6155,Sat (2),Sat (3)
-------------	-----------------	---------------------------

### Sabate

21.00-21.20	RAI Internacia	5955,7290,Sat (4)
-------------	----------------	-------------------

### Aliaj tagoj

(15min.)	Radio Västerås	TTT ( <a href="http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm">http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm</a> )
Korea E-R. I.	TTT	( <a href="http://esperanto-radio.net/knews.htm">http://esperanto-radio.net/knews.htm</a> )

### Satelitaj indikoj

- (1) R. Polonia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11,476 GHz Hpol (TVPolonia), 7,38 MHz
- (2) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11,141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8,10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (3) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 12,692 GHz Hpol, en ORF-DVB-Bouquet, SR 22.000, FEC 5/6
- (4) RAI Internacia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11,446 GHz Vpol (Rai Due), 7,56 MHz

Satelitaj indikoj konsistas el 3 partoj:

- nomo de la satelito kaj ties pozicio;
- frekvenco kaj polarizado (+nomo de la televid-kanalo);
- frekvenco de la aŭda subportanto.

Red. kaj © OSIEK - <http://osiek.org/aera/>



# Argumentoj

Kiel argumenti por esperanto? Tiu demando de tempo al tempo levigas. Mia hereza kaj, mi koncedas, ĝisabsurdigita respondo estas, ke ni tute ne argumentu, ĉar ni ĉiam perdas. Ni estas tro naivaj kaj niaj adversuloj estas tro ruzaj. Ili uzas plurajn strategiojn. Jen tri oftaj:

1. Per ŝajna objektiveco, sed per malserioza voĉo kaj zorge elektitaj epitetoj ili ŝovas esperanton en region de belaj, sed ne realigeblaj, revoj.

2. Ili tute serioze diras, ke tio estas - aŭ estis - bonega ideo, kaj lerte sugestias al la aŭskultantoj mem mense elvoki ĉiujn obstaklojn al tiu bona ideo. Tio memorigas pri reklamslogano, kiun dum mia juneco estis uzata de la esperantistoj mem: "Se ĉiu lernas esperanton hodiaŭ, ĉiuj povus paroli unu kun la aliaj post du jaroj." Tiu efika malreklamo tuj elvokis la person "ĉar la kondiĉo estas fantazia, esperanto estas stultaĵo." Golo memkauzita! "Självmål" ni dirus svede.

3. Ili lerte uzas trompargumentojn. Ekzemplo estas tiu studento (vidu *La Esperon*, 2001:1, p. 4!), kiu diras, ke esperanto ne havas kulturon, tial ĝi ne taŭgas por EU. Li estis tiel diable ruza, tiu studento, ke dubindas, ĉu li eĉ

mem konscias pri tio.

En sia unua frazo li ja plene pravas. Esperanto ne havas kulturon. Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo, estas parto de kulturo kaj samtempe esprimrimedo por aliaj eroj de kulturo. Eĉ ni, kiuj ĉiutage pripensas tiajn aferojn, bezonas tempon kaj trankvilon por analizi tiajn trompargumentojn. Nепreparita publiko ne povas tion fari dum debato kaj tio povas kaŭzi nur perdojn kaj malgajnojn.

Se ne argumenti, kion fari? La respondo estas: Servigu praktike esperanton! Mi memoras pri Lennart Åberg, kiu kolektis kaj ekspoziciis infandeseĝojn el la tuta mondo, mi pensas pri Kerstin Rohdin, kiu aranĝis turistvojaĝojn, pri Franko Luin kaj lia Kiosko, pri la sunkuiriloj en Afriko (vidu *La Hirundon*, februaro 1999 kaj *La Esperon* 2001:1), pri la turismostimulantaj Nepalaj samideanoj. Ktp.

Kaj mi pensas pri tiuj, kiuj produktas rimedojn por facile lerni esperanton. Kaj pri la bibliotekoj, kiuj volonte disponigas tiajn rimedojn, se ni nur ofertas kaj proponas tion.

Bertil Nilsson

**Park.** Dã ser du de fem små annonserna, som vi i Västerås har förberett och som hela tiden kommer att uppdateras.

Om du klickar på **kontakt** och sedan på **länkar** får du en förteckning på andra länders språksajter.

Om du klickar på **press**, får du de senaste pressreleaserna beträffande språkåret

Om du klickar på **sök**, kan du söka vilket ord som helst, t. ex. esperanto. Då kommer automatiskt en sida fram innehållande detta ord.

Du kan också delta i **debatten**. Klicka på den och då kan du välja mellan 5 olika debattämnen som t.ex.:

År engelska det viktigaste språket? Kan man lära sig språk som vuxen?

Ska vi betala för tolkning och översättning?

Några meningsfränder har redan deltagit. Flera inlägg behövs. Det finns utrymme på sajten att skriva vad du tycker.

Wim Posthuma

## TIPS

# Hur man får esperantobokstäver i sin PC

I Word 97 klickar jag på **Insert** i menyraden överst. Sedan klickar jag på **Symbol** och fliken **Symbols** och i rullgardinsmenyn t.v. med rubriken **Font:** väljer jag (klicka på den nedåtriktade triangeln till höger i rutan, så framträder flera alternativ), exempelvis, **Verdana** (eller **Tahoma**). Här finns samtliga esperantobokstäver (såväl gemena som versaler). Jag väljer ett av dessa t.ex. ĉ (c med cirkumflex) och klickar sedan på **Shortcut Key**. Då kan man välja hur man ska få fram tecknet på tangentbordet. Jag väljer då **Alt c** som min tangentkombination, och trycker därför ner tangenten **Alt**, håller den nertryckt och trycker samtidigt på tangenten **c**. Då kommer det att stå "Alt+c" i rutan, och jag klickar på knappen **Assign**, samt stänger dialogrutorna med knappen **close** (två gånger). När jag sedan skriver med Verdana i Word får jag fram ĉ genom att trycka på tangenterna **Alt** och **c** samtidigt.

Jan Setréus

## SPRÅKÅRET 2001

# Europeiska språkåret 2001

Hur hittar du information om allt som händer i Sverige under språkåret på sajten "www.sprakaret.gov.se"?

På den första sidan syns 6 små annonser som handlar om vad som är närmast på gång i Sverige. Om du klickar på dessa kan du läsa mer. I de översta rödbruna raderna finns några rubriker som har länkar till en hel del intressant för oss esperantister. Exempelvis **kalender** som talar för sig själv. Där hittar du det som är planerat i Sverige.

### Språkaktörer

Här hittar du alla organisationer m. m. som har en utförlig beskrivning av det de planerar under året och som inte har kommit på första sidan ännu. Exempel: Västerås Språk- och Kulturfestival.

Klicka på **språkaktörer**, då kommer du till en sida, där du kan välja bland sex "riktningar", bl.a. **intresseföreningar** (som leder till SEJU) och **kulturföreningar**. Klicka på den och till slut på **kulturföreningen FolkeNs**

EUROPEISKA ÅRET FÖR SPRÅK 2001

SPRÅKÅRET | OM SPRÅK | LÄRA SPRÅK | SPRÅKAKTÖRER | SPRÅKÅRETS KAMPEN | KONTAKT

KALENDER | FRÅGOR & SVAR | PRESS | SÖK | DEBATT

2000  
Språk öppnar dörrar  
Bokens Dag med Språk- och

Språk- och Kulturfestival



# La Granda Vortaro Esperanto-Germana

## PRETERE

## PARIZANO AŬ NE

Antaŭ nelonge, en Parizo, policano arestis vagulon kaj kondukis lin al la policejo. La vagulo ne parolis eĉ unu vorton france (li parolis nur germane) kaj la komisaro tute ne konis la germanan lingvon; li do venigis franca-germanan interpretiston por pride-mandadi per li la arestiton.

—Kie vi naskiĝis? demandis la komisaro.

—En Parizo.

—En Parizo, vi do estas franco?

—Ho ne, via sinjora moŝto, mi ne estas franco, mi estas germano.

—Sed, ĉar vi naskiĝis en Francujo, vi devas esti franco!

—Kial? Nu, se mi estus naskiĝinta en stalo, ĉu mi devus esti ĉevalo?

(La Espero 8/1915)

Krause, Erich-Dieter (1999): **Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch**. Hamburg: Helmut Buske Verlag, IVX + 882 p., ISBN 3-87548-193-3, fortika bindaĵo, 19x12 cm

La ĝis nun supozeble plej granda iam ajn eldonita vortaro Esperanto-nacia lingvo aperis en 1999. La prestiĝa lingvistika eldonejo Helmut Buske Verlag Hamburg aperigis la vortaregon. La 882-paĝa, klarlitere kaj dense presita vortaro enhavas pli ol 80 000 artikolojn kaj lingvajn esprimojn en Esperanto kun siaj germanaj ekvivalentoj. La vortaro havas dulingvajn antaŭparolojn (germana, Esperanto), instrukciojn pri la uzo de la vortaro, listojn de mallongigoj kaj uzita literaturo. La lingva materialo konsiderinde superas tion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

Mi faris nur tute supraĵajn unuajn komparojn kaj rigardis la kvanton de la registritaj vortkunmetaĵoj ĉe Krause kaj en PIV:

	PIV (1970)	Krause (1999)
akvo	34	99
infano	19	37
mano	26	56
labori	46	82
lerni	24	27
tiri	41	43
aŭfabla	4	6
granda	24	43
nova	15	29

La Vortaro ne nur registras la ĉiutagan lingvon, sed ankaŭ prezentas multan faklingvan materialon el plej diversaj sciencaj kampoj. La vortaro sendube estas utila ankaŭ por nekonantoj de la germana lingvo. Ĉiu serioza germana esperantisto devus posedi tian vortaron, se li/si vere volas kiom eble plene eluzi kaj majstri la lingvon.

La aŭtoro estas unu el la malmultaj profesie trejnitaj leksikografoj, pri kiuj disponas la esperanta lingvo-komunumo. Li estis profesoro pri indonezia lingvo ĉe la Universitato de Leipzig, membras en la Akademio de Esperanto.

Li verkis i.a. ampleksan vortaron Germana-Esperanto kun pli ol 40 mil artikolovortoj, kiu haveblas ĉe la eldonejo Langenscheidt, krome grandajn vortarojn por la indonezia lingvo. La du malgrandaj vortaroj Esperanto-Germana kaj Germana-Esperanto aperis kunbinditaj same ĉe Langenscheidt kiel "Kompaktwörterbuch".

La nova libro estos havebla kontraŭ ĉ. 78 markoj (ĉ. 39 eŭroj) ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj. Oni ankaŭ povas rekte mendi ĉe la eldonejo, kiu liveras en ĉiujn angulojn de la mondo: Helmut Buske Verlag, Richardstr. 47, DE-22081 Hamburg, tel. 00-49-40-299958-0, fakso: 00-49-40-299958-20, retadreso: buskepubl@aol.com

Detlev Blanke

sukcesis fini ĝin. Sed jam la unua volumo fariĝis klasikaĵo, unu el la plej fierindaj verkoj de la rusa literaturo. Jam dum la vivo de la aŭtoro la kritika literaturo pri "Malvivaj animoj" multoble superis la amplekson de la libro mem. La nomoj de Ĉiĉikov kaj de aliaj protagonistoj jam delonge metaforiĝis, kaj citaĵoj el "Malvivaj animoj" iĝis parto de ĉiutaga vivo en Ruslando.

La 224-paĝa libro estas fortike bindita kaj provizita de bela krom-kovrilo. Ĝi estas mendebla kontraŭ 18 eŭroj ĉe UEA, FEL kaj aliaj gravaj libroservoj, ankaŭ rekte ĉe la eldon-ejo: Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando  
Telefono: 00-7-3432-281711  
Retadreso: <sezonoj@mail.ru>  
<http://www.sezonoj.itgo.com>

Halina Gorecka

## La bibliotekoj kaj ni

En la pasinta numero Inga Johanson skribis pri esperanto en la bibliotekoj. Ne eblas troigi la gravecon de tiu temo.

Troviĝas 289 komunumoj en la lando kaj en ĉiu komunumo estas unu ĉefbiblioteko, ofte kun pluraj filioj, kaj krom tio multege da lerneja bibliotekoj.

Nun imagu, ke ĉiu el ni unufoje jare tutsimple promenus al la plej proksima ĉefbiblioteko, petus blankedon por aĉetpropono kaj per ĝi proponus aĉeton de unu libro eldonita de Eldona Societo Esperanto. Mi forte malrekomendus en tia kazo, ke vi argumentu aŭ eĉ babilu pri la propono, ĉar tio kvazaŭ sugestus, ke ne estas simpla kaj memevidenta devo havigi al la biblioteko tion, kion vi kiel kliento deziras.

Plue imagu, ke la svedaj esperantistoj estus farintaj tion dum la lastaj kvindek jaroj. Eĉ se ni farus nenion alian por esperanto krom celkonscie produkti la ĝustajn librojn kaj proponi al bibliotekoj aĉeti ilin, esperanto hodiaŭ starus neimageble pli forte laŭ ekonomio, prestiĝo kaj informado ol ĝi nun faras.

Kial rezigni pri tio?

Bertil Nilsson

## La ĉefverko de Gogol

Nikolaj Gogol (1809-1852) estas konata en Esperantujo dank' al La Zamenhofa traduko de "La revizoro", eldonita en 1907. Tamen la ĉefa verko de Gogol estas ne "La revizoro" sed "Malvivaj animoj". Finfine ankaŭ "Malvivaj animoj" aperis en Esperanto per la traduko de Vladimir Vyĉegjanin.

"Sezonoj" (Jekaterinburg, Ruslando) eldonis ĝin en februaro 2001 kiel la 32-an volumon de la libroserio "Oriento-Okcidento".

Gogol laboris pri "Malvivaj animoj" dum pli ol dek jaroj, sed li ne





Sten Svenonius  
Vendelsfridsgr 4C  
21764 Malmö



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

## letero de la estraro

### SEF premias fidelajn membrojn

Ĉiun jaron SEF ricevas leterojn de membroj, kiuj informas, ke ili devas, ĉiam kun bedaŭro, rezigni pri membreco en la asocio. Plej ofte temas pri membroj, kiuj aktivis dum jardekoj, sed kies aĝo kaj malboniĝinta ekonomio ne plu permesas eĉ la relative moderan jarkotizon al SEF.

Ni priparolis plurfoje en la estraro, ĉu io estus farebla al tio. Jam antaŭ kelkaj jaroj ni decidis, ke ni devos trovi eblecon reteni membrojn, kiuj dediĉis multajn jarojn de sia aktiva vivo al esperanto. Dank'al malavara donaco de multjara membro ni havas nun la eblecon fari tion.

La donaco — kies donacinto deziras resti anonima — venis al SEF kun speciala postulo, ke la mono estu uzata por maljunaj membroj, prefere tiuj super la aĝo de 70 jaroj. Interkonsente kun la donacinto la estraro tial decidis, ke ĉiuj membroj, kiuj pasis tiun aĝlimon kaj estis membroj de SEF dum 10 jaroj aŭ pli, ne plu bezonos mem pagi membrototizon, sed ke ĝi estos prenita el la speciala fondaĵo.

Ĉar SEF ne konas la naskiĝjaron de ĉiuj membroj, nur tiuj, kies aĝo estas konata, povos utiligi la senkoti-zan membrecon. Meze de junio estos sendita letero al ĉiuj membroj, kiuj plenumas la kondiĉojn, t.e. pli ol 70-jaraj kaj membroj de SEF dum minimume 10 jaroj. *Se vi scias, ke vi apartenas al tiu kategorio kaj ne ricevos leteron pri tio, bonvolu informi pri viaj naskiĝ- kaj membriĝjaroj kaj via nomo estos aldonita.*

### Validas por ĉiuj 70+-membroj

La estraro decidis, ke la senpageco validu ĝenerale, ankaŭ por la membroj, kies ekonomio ne malboniĝis. Se tiaj membroj preferas daŭrigi pagi siajn kotizojn, ili estos registritaj kiel donacoj. Ili estas ankaŭ tre bonvenaj alimaniere ekonomie helpi al SEF, ekzemple per membreco en *Rondo Langlet*.

La sumo en tiu fondaĵo ne estas senlima kaj ni povos tiamaniere premii multjaran fidelecon nur ĝis kiam niaj rimedoj tion permesos. Se vi opinias, ke tia agado estas subteninda, vi povas kontribui al ĝi per donacoj al "Fondaĵo 70+". Vi rajtas fari tion anonime, kiel la menciita donacinto, se vi tion preferas.

SEF, mem 95-jara en 2001, ŝuldas multon al la membroj, kiuj pli kaj pli proksimiĝas al tiu sama aĝo. Tial sentiĝas nature, ke ni premiu ilian fidelecon, kiam estas donita ebleco realigi tion.

# Programo de Sveda Esperanto-Kongreso

*Lesjöfors, 18 – 20 majo 2001*

## Vendredo 18/5

Diskuttago "Med sikte på framtiden"

Komenco: 10.00

Daŭro: la tutan tagon, kun interrompoj por kafopaŭzoj, tagmanĝo kaj vespermanĝo.

Detala programo kaj diskutmaterialo surloke.

## Sabato 19/5

09.00 Akceptejo malfermiĝas

10.00 *Kafo*

10.30 Aŭkcio

11.00 Jarkunveno de sveda sekcio de ILEI

12.00 *Tagmanĝo*

13.30 Malfermo de la kongreso

14.00 Jarkongreso de SEF

Raportoj pri la diskuttago "Med sikte på framtiden"

15.30 *Kafo*

16.00 (*daŭrigo*) Raportoj pri la diskuttago "Med sikte på framtiden"

17.00 Prelego de Zlatko Tišljar "Kial esperanto venkos malgraŭ la esperantistoj"

18.00 Kunveno de sveda sekcio de KELI

19.00 *Kongresa vespermanĝo*

21.00 Distra programo

## Dimanĉo 20/5

09.30 Prelego de Zlatko Tišljar "Eŭropa lingvo kaj eŭropa identeco"

10.30 *Kafo*

11.00 Jarkunveno Eldona Societo Esperanto

12.00 Fermo de la kongreso

12.30 *Tagmanĝo*

13.30 Vizito al la muzeo de Lesjöfors (ekiro de Esperanto-Gården)